GISTO, APR,2007
GOVaske
Strato Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
ttt-kongrua skribo.
ottovaske@ibest.com.br

EEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEEE

ATAKO

Eble kelkaj el vi jam spertis tion kio estos motivo por chi-teksto. Post la pasinta VK mi urgis kiel kutime al la busstacio, akiris bileton por la oportuna horo, kvarono antaù la sesa. Gxi startis akurate. Gxis San-Leo, chiu bonordis. Post kvin minuta halto, reekiro. Tuj post kiam oni atingis la sxoseon BR116 iu fiulo starigxis flanke de la veturigisto kaj anoncis atakon. Li transdonis al la pagigisto plastan mansaketon kaj ordonis: “Prenu la posxtelefonon kaj la monon de chiuj homoj, urgxu!” La funkciulo obeis, iris gxis la fundo de la buso, etendis la malferman mansaketon al chiuj dum li retroiris laù la koridoro. Mi posedis tridek Realojn. Dume la sxtelisto ofte kriis “Rapide...rapidu!” – Reveninte, la ulo enrigardis la saketon, ordonis al la veturigisto haltigi la buson en senluma peco de la sxoseo iom antaù ol gxi forlasis la sxoseon BR116. La sxtelisto desaltis kaj malaperis en la nokto. Estis sabato, salajrotago. Oni imagu familiestron kiu perdis la tuton. Li povus perdi la racion, farigxi kvazaù rabia besto kaj ataki la fiulon per siaj manoj, kalkulante pri la helpo de chiuj pasagxeroj. Okazus pafoj, vunditoj kaj eble mortintoj. Chiuj silentis. Post tio la veturigisto proponis veturi gxis Policejo, registri. Nenio volis perdi eble du horojn sen perspektivo de kompenso por la perdita mono.

En Kaiurbo oni emas igi la busentreprenon instali kameraojn sed gxi pretekstas ke la afero tro multekostas. Oni sugestas almenaù meti afisxon sur la enirpordon **VIDEO ENBUSE** kaj zorgi ke la entrepreno instalu metaldetektilojn che la pordo, same kiel tiuj uzataj en bankoj.

DM-LOTO

Espereble almenaù kelkaj el nia amikaro donis pusxeton al mia propono ensendita al LKK de la 42ª BKE en RIO. Nu, ne diru ke vi tute forgesis pri la interesa afero. Memoru ke nia oficiala organo chiumonate publikigas longan liston de gesamideanoj, kiuj forpasis. Kvin jarojn antaùe estis 960 DMj. Nun restas chirkaù 800. La morto inter ni laboras kun granda sukceso, tial mi revas pri la sukceso de mia propono, ke chiujare almenaù unu aù du novaj DMj aldonigxu al la totalo. Chiu ajn rajtos partopreni... – BV helpe agigi LKK-anon de vi konatan. Sed, baldaù... kontraùe okazos la sama nebuleca pravigo kiun la propono suferis dum la 40ª BKE en PoA!

DANGXERO!
Averto el INTERNET

Se hazarde iam okazos ke ulo kontaktos vin per telefono kaj petos (kun pravigo) ke vi diskumu “21”0211581172839, nepre ne faru tion! – Same ne respondu al posxtelefono n°.(11)99650000. Okazos ke, per artifiko oni uzos vian telfonkonton kaj alpropriigos al si privatajn datenojn viajn, kaj tiujn de parencoj viaj, por

sekvestri vin kiel garantriulon utilan por trude akiri avantagxojn (mono)!

CHO-RO-I

Lastatempe gxia signalo, laù 7310 kaj 9860 Khz, je la 22,00UTC atingas nin malforte = S-2 gxis 4. (Kiam forta, gxi atingas S-9++). La sezonsxangxo kaùzas tion. Richuloj ne plendas. Ili aùskultas gxin chiam bone pere de la retadreso. www.esperanto.cri.cn. Baldaù Chinio havos multajn milionulojn. Hodiaù mi legis en jxurnalo ke la plej richa ino estas chinino, kiu posedas kelkajn miliardojn!

Noto – Domagxo...flanke de la E-stacioj, laù 7325 kaj 7330 Khz aùdeblas hispanlingvaj CHO-RO-I-stacioj chiam kun bela signalo.

KLERA VIZITANTO

Kvazaù orbitanta kometo, chiujare vizitas sian originan vivejon la multfaceta lertulo, nia altgrade estiminda amiko Lenio Marobin, bakalaùro, poligloto, kun du civitanecoj, lerta R-telegrafisto, elstara R-amatoro kaj ILERA-sekretario, tre kapabla esperantisto sed, malgraù la altaj kvalifikoj lia mosxto daùras amiko de malrichuloj. Li ne forgesas sian panjon en Lajxeado, geparencojn kaj gaùchajn gekolegojn. Chiu-jare li honoras kaj felichigas nin per vizito en Kaiurbo. Al li oni proponas churaskon kaj kompense, inter unu glaso da biero kaj tranchajxo sekva, li rakontas pri la vivo en Londono, kie jam nun la logxantoj estas devigataj sxoveli negxon, se ili volas eldomigxi. Li rakontas pri ege modernaj elektronaj aparatoj, etaj kaj je prezoj kiuj ravas kaj kaùzas envion al ni arbaruloj. Emeritigxon la britoj evitas plej longe laù eblas. Dum la sabato Lenio jam ekflugos el PoA/SAO/Paris-Londonon.Tia “fugxo” igas sxajni ke li denove fintas la VK-tagon sed ne, lian feriotempon difinas lia estraro. Se li prokrastigxas unu tagon, suferos lia posxo! Britujo traktas la plej rigore, sen pardono, siajn funkciulojn, rakontas li - - Gxis 2008!

SUB LA JUGO

Ivan Vazov, rakontas pri la liberigo de turka regado super Bulgario. Manskribe troveblas la nomoj de veteranaj gesamideanoj de mi konataj, detempe de mia baza kurso en FGV, che Brazila Kooperativo de Esperantistoj, 1960, inter multaj, F.Viotti, Arruda,Cedilha Neto, Diderto Freto, Amarilio Carvalho, J.Cosenza.--Libro prunte ricevita de amiko Arno el Arrojo do Mejo. Lerte esperantigita far bulgara grupo.

El la KRESTOMATIO

Chiu bona esperantisto memkompreneble iam tralegis la Krestomation. Longaj jaroj forvisxis erojn el la memoro. Mi prenas la rajton rememorigi:

EN BALO

Junulino al juna amiko: invitu al valso la fraùlinon kiun vi vidas tie – Kun plezuro, mia kara, chu sxi estas via amikino? – Ne, kontraùe, sinjoro. Sxi estas mia plej granda malamikino, kaj vi almenaù tretos al sxi la piedojn.

LA FILO

Malricha hebreo volis kristanigxi. La pastro instruis lin pri la pregxo sed lia penado restis vana, char la hebreo estis malinteligenta.

- Nu, mia filo, se vi morgaù scios fari senerare la signon de la kruco, vi ricevos de mi sakon da terpomoj. En la sekvanta tago la hebreo prenis kun si sian filon, portantan sakon por la donaco, kaj li eniris en la domon de la pastro lasinte la filon en la korto.

- Nu, faru la signon de la kruco, diris la pastro. – En la nomo de la Patro kaj de la Sankta Spirito. Amen. – Ne, kie restis la “filo”? – Pardonu, via pastra mosxto, mi lasis lin ekstere, li tenas sakon, por la terpomoj.